

ATINGI LA KONGRESEJON :

La normala vojo estas trans la romia ponto, maldekstre laŭlonge de la rivero kaj dekstre ĝis Place de la République, kie troviĝas la poŝtoficejo, "Crédit Agricole", ktp. "Le Cart", centro, kiu akceptas grupojn dum la tuta jaro (tie okazis la Infankongreseto en 98) estas 50 metrojn poste, 31, Rue Emilien Dumas. Atentu, ke sabaton matene okazas la ĉiusemajna bazono, do eble evitu la urbocentron, sekvu la direkton Alès, Nîmes. Je la dua trafikcirklo vi vidos la vendejon Champion, je la kvara iru trans la rivero, kaj revenu al la urbocentro. Vi povos parkumi apud la aŭtejo Peugeot (paga parkumejo) aŭ trovi lokon apud la rivero ĝis la tendumejo kaj arenoj.

LA KONGRESO



Ĝi komenciĝos je la 10a horo precize por la komitatanoj kaj je 10h30 por la aliaj. Matene, kiel kutime, raportoj kaj projektoj ĝis 12h30. Komuna tagmanĝo (se vi antaŭmendis!). Posttagmeze ekde la 14a h ĝis 19h30: 3 partoj. Laŭ la peto de pluraj federaciaĵoj ni modifis la programon, por ke tiuj, kiuj deziras, povos reĥemeni ĝi ne tro malfrue. Kompreneble temas pri proksimuma horaro. Unua parto ĝis maksimume la 16a horo: demandoj (questions diverses). Poste (2a parto) prelegetos nia najbaro kaj amiko Daniel Moirand ĝis 17h30. Fine (3a parto) ni vojaĝos bilde de Rusiljono al Kroatio kaj Egiptio, ni spektos kurtfilmojn (specialaĵo de Béziers) kaj eble kunkantos.

Pri nia gasto: Daniel Moirand profesie instruas la rusan lingvon en Aix-en-Provence. Eksta akademiano, li verkis tri librojn: "Murdo en Esperantujo", "Materialoj pri la nuna uzado de la akuzativo en E^o" (ambaŭ originalaĵoj) kaj "La libro de la mirindaĵoj" (tradukaĵo). Daniel Moirand estas ankaŭ klubestro en Aix kaj regule helpas somere en la Kastelo Greziljono. Li prelegetos pri kelkaj interesaj anekdotoj el la libro de Marko Polo.

Se vi ŝatus frandi la kompletan libron de Marko Polo, kontaktu antaŭ la 17a de aprilo J. Hénin (vidu la lastan paĝon), kiu aĉetos ĝin en Parizo.

RAPPEL URGENT...

Si vous ne l'avez pas encore fait...
(date limite repoussée du 1 au 8 avril)
...retenez le repas de midi (13 €) auprès du secrétaire : tél (le soir) 04 68 55 51 77.
Repas du soir possible (à 19h30) : 10 €
Repas du soir + nuit (chambre à 2 lits) + petit déjeuner = 28 € (+12€20 pers. seule)



KLASIKA VOJAĜLIBRO

Antaŭ 700 jaroj Marko Polo vojaĝadis vaste de Zanzibaro ĝis Ĉinio, landoj plenaj de mirindaĵoj por tiutempa eŭropano. Liaj spertoj restis influa fonto de informoj kaj inspiro tra jarcentoj. Per sia verko Marko Polo kreis ponton inter

du ĉefaj kultursferoj de la tiama mondo. Ĝia Esperanto-versio, en verva traduko kaj klera prizorgo de Daniel Moirand, trovis naturan lokon en la serio Oriento-Okcidento.

MARKO POLO



A LIBRO DE LA MIRINDAĴOJ
AU
LA PRISKRIBO DE LA MONDO

LA LIBRO DE LA MIRINDAĴOJ AU LA PRISKRIBO DE LA MONDO. Marko Polo (1225-1324). Esperantigis Daniel Moirand. Rotterdam: UEA, 2001. 445p. ISBN 92 9017 075 1. 21cm. Ilus. Serio "Oriento-Okcidento", n-ro 34. Prezo: € 33,00.

Federacia komitato : Atentigo

La kunveno en Sommières por la **komitatanoj komenciĝos je la 10a horo precize**, la ĝenerala kunveno je 10h30 . Do, ne konfuzu !

Triono de la komitato estas renovigebla ĉi-jare . Temas pri : **Suzanne Authier, Patrice Brandy, Charles Gérard-Voinçon, Lucette Négron, Madeleine Vidal** . Tiuj gesamideanoj bonvolos indiki al la sekretario (4, Rue Docteur Rives 66000 Perpignan Tel/Fax: 0468555177), ĉu ili konsentas/deziras resti en la komitato . Novaj kandidatoj por eniri la komitaton bonvolu sin anonci al la sekretario Charles Gérard . Komitatanoj estas niaj delegitoj tra la regiono, ili estas dezirataj en ĉiuj partoj de la regiono .

VIVO DE LA GRUPOJ**BÉZIERS**

La venontaj kunvenoj estos la **13an de aprilo, 11an de majo, 8an de junio** . Povas esti, ke, pro la amika renkontiĝo en Campagnan la 8an kaj 9an de junio, kelkaj ne povos ĉeesti la lastan kunvenon. Do ni antaŭvidas renkontiĝon **la 23an (dimanĉon) de junio**. Ĉar la MVA estas fermata dimanĉe, ni intencas kunveni la tutan tagon en Valras, kun komuna manĝo . Tiun tagon ni devos fiksi ĉiujn datojn por niaj monataj kunvenoj de septembro 2002 ĝis junio 2003; ni devas rezervi la salonon en MVA antaŭ la fino de junio . Ni jam elektis daton por la Z-tago, la 7an de decembro .

Pri la "amika semajnfino" en Campagnan bonvolu legi la lastajn informojn sur paĝo 5a.

Vizito de Junusov :

La grupo akceptis tiun Dagestananon je la 5a kaj 6a de februaro. Tuj post lia alveno kaj rapida manĝo, la okcitana lernejo Calandreta estis feliĉa akcepti lin . En decembro, ni jam iomete prelegis pri E° kaj ni proponis tiun viziton por montri E-on en la praktiko . Sro Junusov prezentis sian landon kaj plurajn tieajn kutimojn al gelnantoj de CM1-CM2 . Tiuj estis tre interesitaj kaj venis tre multaj demandoj pri la kutima vivo en Dagestano . La sekvantan tagon, en MVBA, okazis publika kunveno kun ĉirkaŭ 30 aŭskultantoj, kelkaj el ekster Béziers . Ni dankas ilin . Ni opinias, ke tiuj vizitoj de eksterlandanoj estas dezirindaj, ĉar tiuj, kiuj ne povas partopreni en renkontiĝoj aŭ kongresoj, pro diversaj kialoj, tiel povas paroli kaj kontroli sian scipovon pri la lingvo, eĉ la komencantoj . Estas bedaŭrinde, ke la vojaĝoj de eksterlandanoj ne estas sufiĉe oftaj kaj ĉefe iom pli longaj, ĉar fakte niaj invititoj restas apenaŭ pli ol unu tagon pro la vojaĝo de urbo al alia kaj por ili estas vera maratono .

NDLR : Gratulojn al la grupo de Béziers ! Tute konsentite pri la profito de la vizito de eksterlandano . Vojaĝo tra tuta Francio estas diskutebla, sed multaj grupoj invitas ! La problemo estus alia, se dua grupo en la regiono invitus . Tiel la gasto povus resti pli longe, kondiĉe ke oni ne devigu lin/sin viziti tutan Francion !

Staĝo :

Ni memorigas al vi, ke la staĝo en Vias okazos **de merkredo la 22a ĝis merkredo la 29a de majo** . Christian Herbertte serioze zorgas pri ĝi, li jam ricevis plurajn aliĝojn . Kampadi (en loĝkamiono, ruldromo) aŭ tendumi per propraj rimedoj eblas . Tiuokaze, se vi deziras precizigojn pri la specialaj kondiĉoj, bonvolu turni vin rekte al li : adreso en la januara SFS, Tel/Fax 0467 218 661 . Ne atendu la lastan momenton por aliĝi !

MONTPELLIER

La ĝenerala kunveno okazis la 12an de januaro en MPT Escoutaire . Partoprenis 19 personoj, sendis prokuron 10 . La morala kaj financa raportoj estis unuanime akceptitaj . Pro la nova valuto Eŭro oni decidis rondigi la kotizon : la kotizo por 2002 estos 12 Eŭroj, la abono de SFS 6 E, do la tuta sumo pagota estos 18 E .

En UTT du novaj lernantinoj bonege komencis la kursojn; en MPT Escoutaire Sro Defoly havas 4 lernantojn . Bedaŭrinde la gesamideanoj maljuniĝas... La estraro restas la sama sed novaj personoj helpas .

Prezidantino : A. Tora, Vicprezidantino : M. Boccadifuoco Kasistino : J. Bès, Helpkasistino : C. Poncy Sekretariino : R. Aumeunier, Helpsekretario : F. Lefebvre . Kie estas la egaleco inter viroj kaj virinoj ?

La monataj kunvenoj okazas **sabaton matene : (la 2an de februaro, la 9an de marto), la 25an de majo, la 15an de junio** . Se vi ankoraŭ ne pagis vian aliĝkotizon por 2002, sendu ĝin al S-ino A. Tora CD 17, Appt 13 Résidence Les Pins, 1577 Avenue de Maurin 34070 Montpellier .

La 2an de februaro partoprenis la monatan kunvenon 16 personoj . Gaja etoso pro la legado de humuraj tekstoj kiel "La aĝoj de la vivo" de Schwartz aŭ skeĉoj . S-inoj Boccadifuoco kaj Dumas, helpitaj de Sroj Dumas kaj Lentaigne, plagiatis la poemon de Baghy : "Mi estas Esperantisto" . Ni multe amuziĝis ! Poste Sro Dumas parolis pri Dagestano por prepari la viziton en Béziers de Dagestana ĵurnalisto . Tagmeze ni festis la Kandelfeston per bongustaj krespoj kaj kukoj, kompreneble ankaŭ per bonaj trinkaĵoj !

La 9an de Marto nia prezidantino prezentis la ĉeestantojn al du novaj membroj . La 18 partoprenantoj ĝojis pro la reveno de J. Bès kaj E. Tarrou; ni deziras bonan sanon al ili . A. Tora parolis pri la kongreso de Sommières, pri la programo kaj petis helpojn de ni por la distra parto . Estis ankaŭ mencio de la venontaj staĝoj kaj kunvenoj de marto ĝis majo . Sekvis parolado de Leo Lentaigne pri malnovaj fotoj kaj revuoj, ĉiuj datiĝis de antaŭ la dua mondmilito ! Fine de la kunveno, dekduo da personoj piknikis surloke en simpatia etoso .
Dankon al Rosa Aumeunier-Raspall pro la detalaj raportoj .

PERPIGNAN

*Pri Perpignan alvenis nekutima nombro da kontribuoj, speciale gazetartikoloj (vidu ankaŭ la rebatojn de la p.10 kaj la tekston de J. Amouroux sur p. 8/9) . La grupanoj ankaŭ vizitis la fervojistan kongreso en Port-Vendres . Je tiu okazo R. Bénazet kaj C. Gérard prezentis lumbildaron pri la regiono de Perpignan; ĉeestis tiun prezenton nia Honora Prezidanto R. Llech-Walter al kiu la grupo deziris antaŭ nelonge ĝojan naskotagon . Kompreneble ni kuniĝas la bondezirojn . Ne malproksimas la jarcento !
 La anonco dekstre aperis samtage (26/2) en "L'Indépendant" kaj "Midi Libre" .
 La 15an de marto aperis denove en "L'Indépendant" detala raporto pri la akcepto de 40 germanaj gelernantoj en la kolegio de Cérêt . La afero kompreneble ne rekte rilatas kun E°, krom ke la tiea urbestro fine de sia parolado menciis E-on, kio mirigis la ĵurnaliston kaj certe aliajn personojn . Juĝu mem !*

Esperanto ? Enĉin, le maire, Alain Torrent, a dit que bien qu'ayant une belle fille allemande, lui-même n'avait "malheureusement aucune connaissance de la langue allemande". Il a affirmé que l'ouverture de la ligne Perpignan-Frankfurt allait lui permettre de "tenir plus facilement son engagement de venir bientôt à Lüchow". Il a estimé que "ces échan-


ges contribuent à une compréhension meilleure de tous les pays d'Europe". Tout en regrettant qu'il reste "un barrage encore, celui de la langue". Aussi bien a-t-il ajouté : "Bientôt une langue commune ? L'espéranto, dommage, n'a pas pris l'envolée suffisante". Dire ça à des personnes qui parlent la langue de Goethe alors que soi-même on parle la langue de Ramon Llull !

Cours d'espéranto

Ce mardi, cours de langue internationale espéranto ; à 15 h perfectionnement ; à 16 h, cours première année. Le Centre culturel des P.-O. organise des cours par correspondance; cours d'initiation pour tout public. Les personnes qui désirent s'informer sur la langue internationale peuvent consulter le site de la Fédération Languedoc-Roussillon : <http://www.chez.com/esperantosf>. Le siège de l'association est ouvert tous les mardis de 14 h 30 à 17 h, tous les samedis, de 9 h à 11 h, au 72, avenue du Général-de-Gaulle à Perpignan. Tél. 04 68 34 54 38 ou tél./fax 04 68 55 51 77. e.mail : charles.gerardvoincon@laposte.net

Fervojista kongreso en Port-Vendres :

Partoprenis centoj da personoj, inter kiuj kelkaj eksterlandanoj el Aŭstrio, Belgio, Germanio, Hispanio, Italio, Japanio, Kroatio, Svislando . Preparis la tuton tre zorgeme Ges. Lafosse (Tuluzo), kiuj estas gratulindaj . Amika senceremonia etoso, kiun ni ege ĝuis . La kongresoj de AFCE (eble venontjare en Bergerac) estas ankaŭ malfermataj al ne-fervojistoj . Minimuma oficiala parto (ĝenerala kunveno), interesa prelego de Dro Bolognesi . Agrablaj kaj diversaj vesperoj; ni speciale ŝatis la koncerton de Jomo (aĉetebblas lia KD "Jomo friponas", se hazarde vi ne konas liajn kapablojn) . Por tiuj kiel ni, kiuj uzas esperanton por turismi, tia kongreso estas plej kongrua . Ni havis la okazon viziti la belan regionon per buso (mirigaj keloj Rocbère), per trajno (revenante de Odeillo per la flava trajneto) aŭ per ŝipo laŭlonge de la marbordo . Tiun lastan eblecon ne ĝuis ĉiuj, ĉar iuj preferis reveni de Banyuls per trajno anstataŭ ol per ŝipo ! Ni, montaranoj, surpriziĝis, ke ni ankaŭ eltenas ŝipveturadon . Dum la restado la nutraĵo estis abunda kaj bongusta ; la kongresejo situis rekte ĉe la haveno . Eble estos okazo montri kelkajn lumbildojn pri la kongreso dum nia kunveno de Sommières . J.H.



DIVERSLOKE

Okaze de kultura vespero pri poezio en Sommières (en Cart, kie ni baldaŭ kongresos), nia samideano Nikolao legis du poemojn en esperanto . Ne anticipu informitaj, la ĉeestantoj reagis pozitive .


Petinte de Attac, kies membro li estas, aperigon de retmesaĝo naciskale pri E° dank'al teksto jam premiita en Carnoux, Francis Bernard havis la surprizon trovi la rapidan reagon de esperantistino el Loreno . Ne hontu pri E° kaj kiel Francis menciis ĝian ekziston kaj utilon kadre de viaj ne-esperantistaj asocioj !

TRIA AMIKA SEMAJNFINO EN CAMPAGNAN-VILLAGE

(Departemento 34 apud PAULHAN sur la RN 9)

SABATON LA 8an kaj DIMANĈON LA 9an DE JUNIO 2002.

ĈE Gilbert SANTOS kaj Marité LEMAIRE 13 chemin des Auberguets.



Por la tria fojo, ni proponas al vi semajnfinojn dum du tagoj, la 8a kaj la 9a de junio 2002 ĉe Gilbert SANTOS kaj Marité LEMAIRE. Nia domo situanta sur monteto permesas belan vidaĵon. Ni povas loĝigi kelkajn personojn (bonvolu alporti litaĵojn). Eblas akcepti tendojn kaj ruldomojn.

CAMPAGNAN-VILLAGO SITUAS APUD PAULHAN sur la RN9 (dekstre se vi venas de Béziers, maldekstre se vi venas de Millau.)

Ni esperas ke vi venos sufiĉe nombraj al tiu tria rendezuo kaj ke estontece estos aliaj tiaj renkontoj.

PROGRAMO

Sabaton la 8an de junio 2002

10h-12h Akceptado de la partoprenantoj
kaj pretigo de la tagmanĝo
12h-12h30 aperitivo
12h30 subĉiela manĝo
15h promenado aŭ babilado ktp
21h vespermanĝo

Dimanĉon la 9an de junio

matene kaj tagmeze: manĝo
posttagmeze: ripozo, promenado, babilado, televido,
skeĉoj, ktp...

Familia nomo	Nombro de Partoprenantoj	sabato tagmanĝo	sabato vespermanĝo	dimanĉo matene	dimanĉo tagmanĝo	SUMO
.....	8 € X... = €	5 € X... = €	1,5 € X... = €	8 € X... = € €

Bonvolu kompletigi l'aliĝilon kaj resendi ĝin antaŭ la 1a junio (ĉeko je la nomo de SANTOS adreso: Gilbert SANTOS kaj Marité LEMAIRE 13 chemin des Auberguets 34230 CAMPAGNAN-VILLAGE).

inter maro kaj lagoj

niaj pasiaĵoj interdoniĝu

LE LAZARET
 centre familial
 familia feriejo



CENTRE FAMILIAL du LAZARET

La Corniche (Rue du Pasteur L. Benoît)

34200 SETE

Tél. 33 (0)4 67 53 22 47 - Fax 33 (0)4 67 53 36 13

INVITO AL LA 28A INTERNACIA SEMAJNO ĈE MEDITERANEO DE LA 24A ĜIS LA 31A DE AŬGUSTO

INTERNACIA SEMAJNO ESPERANTISTA

La asocio "Esperanto Kulture kaj Progreso" proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto.

Profitu, samtempe trapasi agrablajn feriojn en la havenurbo SETE, en ripoza parko de pluraj hektaroj che Mediteranea bordo, dum ideala periodo pro la bela vetero sed ekstere de la somera troa homamaso.

Che ni vi ghuos plurnivelajn kursojn kaj ankaŭ... banadon, fishkaptadon, ekskursojn kaj... bonan manghajhon.

Rete : ch = ĉ , gh = ĝ, jh = ĵ

SÉJOUR LINGUISTIQUE AU BORD DE LA MER

L'association "Espéranto culture et progrès" vous propose d'apprendre ou de vous perfectionner en Espéranto.

Profitez-en pour passer en même temps d'agréables vacances à SÈTE, dans un parc reposant de plusieurs hectares au bord de la Méditerranée pendant une période idéale jouissant d'un temps excellent et en dehors de l'afflux estival.

Chez nous vous pourrez suivre des cours de plusieurs niveaux mais aussi profiter de baignades, pêche, excursions et ... bonne nourriture.



Programo : Matene : diversniveleaj kursoj (perfektiga kurso kun Pierre Babin, paroliga kurso kun Mario Guzzi (Italio), kurso por komencantoj : nefrancdevena gvidanto estas nun serĉata)

Posttagmeze : ekskursoj, kursoj aŭ libera tempo **Vespere** : amuzaj, distraj kaj kulturaj programoj .

Informoj kaj Aliĝoj : Esperanto Culture et Progrès ĉe Yvette Vierne 5, Rue Docteur Roux 34090 Montpellier
 Tel/Fax : 04 67 54 15 43 yvierne@netcourrier.com aŭ nikolao.k@wanadoo.fr
<http://perso.wanadoo.fr/nikolao/esperanto.html>

Aliĝkotizoj : 55 € antaŭ la 1a de majo, 70 € poste; senpage por gejunuloj malpli ol 26jaraj

Limdato por aliĝo : la 14a de julio

La prezoj duoniĝas por la loĝantoj de la landoj en kategorio B de UEA, kondiĉe ke ili parolu flue Esperanton kaj prelegu pri io .

Aliĝilo estas sur paĝo a

28a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO28^{me} SEMAINE INTERNATIONALE D'ESPERANTO

SETE : 24-31/08/2002

ALIĜILO

Bulletin d'inscription



Familia NOMO (Nom)

Persona NOMO (Prénom)

Adreso (Adresse)

Telefon-numero (n° de téléphone)

*(forstreku la neutilan linion / rayez la mention inutile)

*Mi loĝos en la feriejo "Le Lazaret" / Je logerai au centre "Le Lazaret"

*Mi antaŭmendas unu liton / Je réserve un lit

-en unupersona ĉambro (dans une chambre pour une personne)

-en dupersona ĉambro (dans une chambre pour deux personnes)

*Mi ne loĝos en la feriejo sed mi manĝos tie regule / Je ne logerai pas au Lazaret

mais j'y mangerai régulièrement

*Manĝoj en feriejo "Le Lazaret" / Repas au Lazaret

Mi estas vegetarano (je suis végétarien) / Mi ne estas vegetarano (je ne suis pas végétarien)

*Mi pagas la aliĝkotizon / Je règle l'adhésion

de 55 € (ĝis la 1a de Majo / jusqu'au 1^o Mai) aŭ de 70 € (poste / ensuite)

Neniu aliĝkotizo por gejunuloj malpli ol 26jaraj / Pas de cotisation pour les moins de 26 ans

*Mi mendas la loĝadon kaj antaŭpagas 100 € / Je réserve le logement (acompte de 100 €)

*Mi pagas entute.....€ (.....€ por la aliĝo kaj 100 € kiel antaŭpago por la loĝado)

Je règle€ (dont€ pour l'adhésion) et 100 € pour le logement (acompte)

Prezoj de la semajno por la loĝado kaj tri manĝoj ĉiutage

Tarifs de la semaine pour la chambre et trois repas par jour :

-1 persono en unupersona ĉambro / 1 personne dans une chambre d'une personne : 338 €

-1 persono en dupersona ĉambro / 1 personne dans une chambre pour deux personnes : 261 €

-1 persono en familia ĉambro / 1 personne dans une chambre familiale : 261 €

- Infano malpli ol 12jara / enfant de moins de 12 ans : 165 €

Eblas tendumi; ankaŭ hoteloj estas je via dispono ; la feriejo taŭgas por rulseĝuloj

Il est possible aussi de camper ; des hôtels sont aussi à votre disposition ; le centre est adapté aux personnes utilisant des fauteuils roulants .

Sendu la aliĝilon al / Envoyez le bulletin d'inscription à

ESPERANTO CULTURE ET PROGRES 5, Rue du Docteur Roux 34090 MONTPELLIER

Pagu al "Esperanto Culture et Progrès", bonvolu aldoni afrankitan koverton kun via adreso

Veuillez joindre un chèque à l'ordre de "Esperanto Culture et progrès" ainsi qu'une

enveloppe timbrée à votre adresse .



Unuaj semoj de Esperanto en Vjetnamio estis Rusiljonaj

En la subprefekteja rubriko de Prades, la plej legata rusiljona tagĵurnalo, "l'Indépendant", publikigis longan artikolon sub la titolo : "L'Espéranto, une langue à apprendre en Conflent" (4a de februaro 2002).

"Conflent" estas la parto de Rusiljono, kiu kuŝas je l'piedo de monto Canigou . Ankaŭ ĝi estas la nomo de la eldonejo, kiu aperigis "Histoire du mouvement espérantiste en Roussillon" en 1985, al kiu mi cetere resendas la legantojn .

La koncerna artikolo estas informiga pri Esperanto kaj anoncas la starigon de E-grupo kaj kurso en Prades . Al ambaŭ entreprenoj ni deziras la meritatan sukceson .

Kun multe da entuziasmo la tuton iniciatis Christian Pinard, tute freŝe bakita esperantisto, dank'al interreto, kies senlimajn eblecojn li tre profite utiligas . Por ilustrati la artikolon, li estas fotita ĉe la tombo de Auguste Carrère en Prades, tie mortinta antaŭ ĝuste 80 jaroj, nur kelkajn tagojn antaŭ li estu 54-jaraĝa . Ankaŭ en Rusiljono naskiĝis Augustin Carrère . Retrospektiva




parto de la artikolo iom diras pri la E-agado de A. Carrère en Koŝinĉinio, parto de la nuntempa Vjetnamio . "Enciklopedio de Esperanto" apenaŭ parolas pri li (p.211) kaj kvazaŭ nekonata estas la broŝuro eldonita de la esperantista grupo de Koŝinĉinio en Sajgono (1908), kies prezidanto estis A. Carrère, en la franca lingvo, pri la temo : "La internacia helpa lingvo en Ekstrem-Oriento - ĉu la malaja lingvo, ĉu Esperanto ?" .

Laŭ "Espérantista Societaro" je la 30a de junio 1906 la E-grupo estis fondita en 1905 subprezide de A. Carrère, profesoro ĉe la porinstruista lernejo . Unu jaron kaj duonon poste li estis direktoro de la sama lernejo . Poste li iĝis inspektoro de la lernejoj .

Mi iam havis enmane ne malmultajn esperantistajn librojn, eldonitaj de Hachette en la renoma "Kolekto aprobita de D-ro Zamenhof" . Ĉiuj estis permane subskribitaj de A. Carrère kun la sama data mencio : "Vichy 3 Aôut 1905", kio igas min pensi, ke dum kuraca restado en la fama termofonta urbo, li aĉetis tutan serion de libroj, esperantiĝis kaj fondis grupon en Sajgono .

Tiu lerna kaj beletra libroservo havis duan vivon : ja, en 1930, Robert Gendre ĝin aĉetis ĉe brokantisto... kaj esperantistiĝis . La plej malnovaj esperantistoj de nia regiono tutcerte memoras pri Robert Gendre (= "Bofilo") .

La lasta spuro, kiun mi trovis pri Auguste Carrère en Sajgono - nun nomata Hô Chi Minh - krom enskribo por la 10-a universala kongreso de Esperanto en Parizo (aŭgusto 1914), cetere ne okazinta pro la militdeklaro, estis poŝtkarto, kiun li skribis la 28-an de marto 1913 al franca korespondanto, en kiu li diris : "Mi alvenos Francion per la sekvanta kuriero" (= "per sekvanta kunliga aviadilo") .





Dua rusiljona semanto de Esperanto en Vjetnamio estis kapitano Marcel Saillens .


Kiam la esperantista grupo de Perpignan solide strukturiĝis, en januaro 1911, la du vic-prezidantoj estis du kapitanoj de la 24-a kolonia regimento ; M.Saillens (naskita en 1869 en la kantono de Prades), diplomita (de la S.F.P.E.) profesoro de Esperanto, krome fariĝis delegito de U.E.A.

Tiuepoke ne longatempe li restis en Perpignan kaj en 1913 li jam estis delegito de U.E.A. en Mon-Cay (Tonkino), en la nuna norda parto de Vjetnamio, kie li daŭrigis sian kapablan poresperantan agadon .

Freŝnomita bataloniestro, li fiere pozis en parada uniformo kun pendantaj plej altrangaj dekoracioj inter kiuj, sur la unua vico, troviĝis la esperantista insigno .

Pro la militdeklaro li estis alvokita sur la batakkampon . Dufoje citita je la rango de l'Armeo, li estis grave vundita je la terura batalo de la Somme-kampo . Li mortis en pariza milithospitalo la 19-an de oktobro 1916 kaj estas enterigita ne malproksime de Perpignan .

Jean Amouroux



(Tonkino) la 11/13
 Jesuŝajnoj Julia
 Bonvolu akcepti, krome de la
 venonta jaro, miajn incerajn
 kondiĉojn -
 Ĝis la vido ne venos!
 Kun respektplena kaj indoneca.
 Kapitano Saillens

DANS LA PRESSE RÉGIONALE**"L'INDÉPENDANT" DE PERPIGNAN****"L'esperanto :
future langue
européenne ?"**

Le courrier de M. Robert Gicquiaud de Saint-Estève paru le 26 janvier a suscité la réaction de plusieurs lecteurs. Nous avons regroupé leurs réponses. Voici celle de M. Jean Amouroux de Perpignan : Je relève une phrase qui peut prêter à confusion : "Pourquoi ne pas pousser plus loin la politique de l'absurde en envisageant l'abandon du français et l'application d'une langue commune ?". Je ne sais pas si cette analyse reflète bien l'idée de son auteur mais tel n'est pas mon propos. Tout comme il ne faut pas confondre une "monnaie internationale commune" et une "monnaie internationale unique" du type euro se substituant aux autres. Je pense qu'en matière de vecteur de communication internationale, si une "langue commune" est nécessaire, une "langue unique" est pernicieuse. Il ne faut pas confondre "unité" et "uniformisme". Pour le respect de toutes les identités, le choix d'une langue commune ne doit induire aucune hégémonie et relève d'une réelle volonté politique. Par nature, seul l'esperanto, langue auxiliaire vivante supranationale, peut jouer ce rôle. C'est ce qui fait sa force et sa faiblesse mais c'est une idée qui se fraie un chemin.

**COURRIER
DES LECTEURS****"L'euro c'est zéro"**

.../... les Français sont-ils d'accord pour fusionner en un seul peuple et pour transformer la France, notre nation, en provin-

ce d'un état continent. Et au-delà, pourquoi ne pas pousser plus loin la politique de l'absurde en envisageant l'abandon du français et l'application d'une "langue commune" ? En ce qui me concerne, comme l'ont dit bien d'autre avant moi : l'euro c'est zéro.

M. Jean Hénin de La Canourgue (Lozère) : Au-delà de la gêne dans la manipulation de la nouvelle monnaie et des prix arrondis vers le haut, l'Europe a fait un grand pas. Les pays qui ont adopté l'euro s'y sont mis avec enthousiasme, avec aussi l'espoir d'une monnaie solide qui ne dépendrait plus du dollar, et les candidats à l'élargissement de l'Europe ne manquent pas ! Il serait logique maintenant, et pas du tout "absurde", de trouver un langage commun pour construire l'Europe des hommes. Non pas un langage unique menaçant les langues actuelles, ce qui pourrait être le cas avec l'adoption de l'anglo-américain qui favoriserait le pays le moins européen, mais une langue simple et neutre. Le latin, complexe et inadapté au XXI^e siècle, ne peut être retenu. Reste l'esperanto, ce latin moderne qui a retrouvé une nouvelle vigueur avec la mondialisation et Internet. Il s'agirait d'une "langue pont" pour communiquer avec les autres Européens sur un pied d'égalité, chacun gardant sa culture, sa langue et ses spécificités.

M. Maurice Sujet de Jouy-sur-Morin (Seine-et-Marne) : M. Gicquiaud présente une excellente idée. L'euro a recueilli l'adhésion de nombreux Européens car il facilite leurs rapports économiques et leur donne conscience qu'ils appartiennent à une même communauté économique. Il serait judicieux de doter ceux-ci d'une langue commune qu'ils maîtriseraient à l'égal de leur langue maternelle : ils pourraient librement communiquer dans toute l'Europe et prendre conscience qu'ils appartiennent aussi à une communauté culturelle européenne. Il ne peut s'agir d'une langue ethnique, difficile à maîtriser par tous, qui donneraient à certains Européens un privilège linguistique contraire aux principes fondateurs de la communauté européenne. Ce ne peut être non plus une langue minimale pour des raisons pratiques et culturelles évidentes. La solution qui a fait ses preuves est l'esperanto : il assure une communication de qualité entre ses locuteurs qui le parlent avec la même aisance que leur langue maternelle et constitue un vrai tremplin pour apprendre d'autres langues.

"L'HÉRAULT DU JOUR"

Les pays candidats veulent faire entendre leur voix était le titre d'un long article qui rendait compte de la première réunion de la "Convention sur l'avenir de l'Europe". Quelques extraits :

.../... Les délégués des pays candidats souhaitent également que leur langue maternelle soit présente dans les travaux de la Convention.

Il ne s'agit pas "d'ajouter 11 nouvelles langues" de travail pour la Convention, qui fonctionne pour l'instant dans les onze langues officielles de l'Union européenne, a souli-

gné Jan Kavan (ministre tchèque)
La question de la langue pose problème

"Mais je propose, avec le soutien des représentants des pays candidats, de traduire dans nos langues tous les documents importants" de la Convention, a-t-il ajouté.

La députée lettone Inese Birznicce, l'une des animatrices de la réunion, a souligné l'importance que revêtait la question de la langue pour les pays Baltes, par exemple.

Il est important que "les gens sentent que l'Europe ne va pas infliger à ces langues le même traitement que l'Union soviétique" leur réservait en son temps.

NDLR : Le Cercle Biterrois d'E° a attiré l'attention du journal sur le problème des langues en Europe et dans le monde et rappelé l'efficacité de l'Espéranto.

Proposition d'étiquette
(SFS 159, page 2)



Pour l'EUROPE
une monnaie, l'EURO
une langue-pont,
l'ESPERANTO



Strasburgo, intelekta, arta kaj ekonomia ĉefurbo de Alzaco havas amplekson, etoson kaj allogpovon de ĉefurbo sen havi ties troecon. Estas urbo kiun oni neniam laciĝas revidi, car ĝi ĉiam havas ion novan kaj esencan por diri.

Kaj ĝuste tie **Espéranto-France**, **Espéranto-France-Est** kune kun **Espéranto-Jeunes**, **FET** (laboristoj), **GEE** (instruistoj), **FKEA** (katolikoj) kongresos je pentekosto 2002

La kongreso komenciĝos je la 15-a horo, vendredon la 17-an de majo kaj finiĝos la 21-an de majo per tuttaga ekskurso. La ĉefaj eroj de la kongreso okazos en "Fossé des Treize", rue du Fossé des Treize.

Diversaj programeroj de **Espéranto-Jeunes** okazos en Junulargastejo "René Cassin".

Turisma programo

Malkovro de Strasburgo, vizito de bierfarejo, vizito de potista vilaĝo Betschdorf, kaj marde tuttaga ekskurso al fama kastelo Haut-Koenigsbourg kaj vizito de Colmar.

Vesperprogramo

Bonveniga vespero, interkonatiga bufedo, prezento de partoprenantaj asocioj kaj laborgrupoj, Koncerto de Mōrice BENIN, bankedo en tipa restoracio.

Prelegoj

Prelego de Georges KERSAUDY, aŭtoro de "Langues sans frontières" kaj pluraj aliaj prelegoj interalie pri Alzaco.

Oficialaj kunvenoj de diversaj asocioj komitatkunsidoj kaj Membrokunveno de **Espéranto-France**, membrokunvenoj de **Espéranto-Jeunes**, **GEE**, **FET** kaj **FKEA**.

Aktivulaj laborgrupoj:

Komisiono pri eksteraj rilatoj, Informado, KD-romoj, Interreto.

Informoj pri la programo kaj aliĝiloj estas haveblaj de **SFS** (adreso sur la lasta paĝo)

UNIVERSALAJ KONGRESOJ

Komence de Aŭgusto okazos la ĉijara UK en **Fortaleza (Brazilo)**. **Espéranto-France** proponas du vojaĝojn

- a) irflugo la 1an de aŭgusto kaj revenflugo la 12an, loĝado dum la kongreso en komforta tristela hotelo
- b) same + ekskursoj de la 11a ĝis la 16a de aŭgusto (Rio, insuloj, Iguacu-akvofaloj, Itaipu-baraĝo..)

Reveno la 17an de aŭgusto. *Detalojn pri tiuj du eblecoj petu de SFS.*

En 2003 la UK disvolviĝos en **Göteborg (Svedio)**. Nun estas konataj la kongresurboj por 2004 kaj 2005.

En 2004 akceptos la UK Pekino (Ĉinio) kaj en 2005 Vilnius (Litovio) kun antaŭkongreso en Francio (centa datreveno de la kongreso de Boulogne sur Mer).

PASPORTA SERVO

En 2001 la libreto entenis 1161 adresojn de gastigantoj en 80 landoj; en 2002 ĝi entenas 1231 adresojn en 83 landoj. La plej gastigema lando restas Francio (113 adresoj en 73 urboj), la plej gastigema urbo estas Tehran (Irano) kun 17 adresoj, la gastiganto kiu ofertas plej multajn tranoktojn (90) loĝas en Lomé (Togolando), la adresoj, kie oni invitas plej multajn gastojn (20) estas en Wien (Austrio) kaj Brašov (Rumanio), la plej junaj gastigantoj (16jaraj) loĝas en Tangshan (Ĉinio) kaj Barti (Italio). *Aliĝiloj disponeblas por la venonta eldono.*

NOVA SIDEJO

Sat-Amikaro akiris novan lokalon 134, Bd Vincent Auriol, Paris 13°, en taŭga situo (proksimeco de metroa stacio Place d'Italie). La inaŭguro okazis mezmarte.



DIVERSAĴOJ

Anonceto

Por ekspozicio mi aĉetas.... (Bazoprezo : 3 Eŭroj po peco)...grupajn fotojn aŭ fotokopiojn pri regionaj aŭ naciaj Esperanto-kongresoj (1900-2000) okazintaj en regionoj Rodan-Alpoj, Provenco, Langvedoko-Rusiljono . Nepre menciu la lokon kaj daton .
Antaŭdankon .
Roger Colney BP 126 05004 Gap Cedex

STAGEJOJ



KULTURA ESPERANTO-DOMO

Kastelo Grésillon

49150 BAUGÉ

☎ 02 41 89 10 34

<http://greziljono.kastelo.free.fr>

Laborsemajnfinoj (manĝaĵoj kaj loĝado senpagaj kontraŭ fizika laboro) :
27-28 IV / 8-12 V / 22-23 VII
Infansemajno : 13-20 IV
6-13 VII : kursoj 13 VII : Mezepoka festo
13-20 VII : kursoj 20 VII : 50 jaroj de Grésillon
+ prezento de la jubilea memorlibro
20-27 VII : kursoj 27 VII - 3 VIII : kursoj
3-10 VIII : kursoj 11-18 VIII : staĝo pri astronomio

Kvinpetalo E°-centro 86410 Bouresse

Tel/Fax : 05 49 42 80 74

<hometown.aol.com/yannickdum/kvinpetalo.html>

9-13 IV : "La ŝtona urbo" kaj la nerona tempo
19-25 IV : "Baza legolisto" de W. Auld
29 IV-3 V : Botaniko 8-12 V : Piedmigrado
18-22 VI : Altnivela lingvokurso kun muziko
9-16 VII : aktorarto k. aktorado aŭ jogo
19-23 VII : preparado al Altaj Studoj
6-10 VIII : Preparado al "Kapableco" (skriba parto)
fine de oktobro : praktikado de la lingvo
10-15 XII : Unu jarcento de E° tra la verkoj de Valo

Ne forgesu : Vias (22-29 V), Sète (24-31 VIII)

EŬROSCOLA

Partoprenis/os ĉijare 10 grupoj da gelernantoj en la Parlamentejo de Strasburgo . La 19an de marto : Finnlando, Francio, Hungario, Kroatio, Rusio, Ukrainio. Partoprenos la 17an de aprilo : Belgio, Italio, Pollando kaj Slovenio . Entute 70 gelernantoj de E°.

SKRABLON LUDI en Esperanto kontraŭ aliaj esperantistoj nun eblas (du ĝis kvar personoj) .
<http://vek.komputilo.org/~argilo/>

ELEKTRONIKAJ LIBROJ

176 libroj estas nun je via dispono sur la reto . La lasta, en du volumoj, estas la romano "Quo vadis ?" de la pola aŭtoro Henryk Sienkiewicz . La eLibroj eĵuteblas ĉe <http://esperanto.nu/eLibrejo>.

EN LA PORTUGALA

ekzistas nun la libro de Claude Piron "Le défi des langues" : "O Desafio das Linguas" . Tute taŭga aperdato antaŭ la UK de Fortaleza .

EN LA LERNEJOJ

estas nun deviga la instruado de fremdlingvo. 94% de la klasoj CM1/CM2 proponas tiun instruadon, nur 42% en CE2, kie oni devus ĝeneraligi en septembro... La plimulto de la Eŭropaj landoj devigas la lernadon de du lingvoj en mezlernejoj, la esceptoj estas Belgio, Hispanio, Italio, Portugalio kaj Britio .

LA LINGVO DE SIGNOJ

estas nun agnoskita de la Nacia Edukado . LSF (lingvo de signoj franca) havas nun la saman statuton kiel la aliaj lingvoj .

ELIZEO a) fabela lando b) Paradizo (laŭ PIV).

Ĝi estas ankaŭ la pariza rezidejo de la Prezidento . Por la venonta baloto ne mankas kandidatoj, la definitivaj nomoj ne estas ankoraŭ konataj . Pridemanditaj pri Esperanto, iuj restas silentaj . Pluraj sin deklaris favoraj : C. Taubira, A. Waechter -male al la aliaj ekologiistaj kandidatoj - (rete estas trovebla la ĉarto de lia partio en E°) kaj R. Hue (kun nuancoj) . A. Laguiller ne estas malfavora sed opinias, ke estas pli urĝaj problemoj . J-P. Chevènement malfavoras "artefaritan" lingvon, al kiu mankus "koro, animo kaj historio", kvankam aliparte la historio de esperanto devus esti en la lernejoj programoj pri historio...

SCIENCO KAJ SOCIO

estas la temo de "Internacia Esperanto-Konferenco 2002" organizata de Osiek en Leuven (Belgio), proksime de Bruselo, de la 20a ĝis la 26a de julio . Konferencoj, diskutoj, distro kaj turismo estos la ĉefaj elementoj . Informilo haveblas ĉe SFS aŭ rete esperanto3000@esperanto.be.

ĜIRKAŬ LA MONDO

aŭ almenaŭ parto de ĝi (Pakistano, Ĉinio, Mongolio, Siberio)... per biciklo... estas nekutima vojaĝo de Bretono kaj Esperantisto (Zef Jégard), rakontata en baldaŭ aperonta libro (en la franca -speciala tarifo por antaŭmendo 20 €, sendkostoj entenataj, al ZJ 13, Rue du Val Josselin 22120 Yffiniac). La venonta vojaĝo estos Nordameriko ĝis Alasko .

KONGRESO EN HISPANIO

SAT (67, Avenue Gambetta 75020 Paris) kongresos en Alicante de la 1a ĝis la 7a de julio .



Difficile de résister au plaisir de vous communiquer deux articles de journaux récents et positifs pour l'E° . Le premier est l'éditorial de C. Litaud, rédactrice en chef de "Côté femme" (n°131 du 13/3) . Une double page illustrée détaille par ailleurs l'expérience de Josette Ducloyer .

Quant au second, il faut signaler que Michel Vincent n'en est pas à son premier plaidoyer pour l'espéranto . D'après "Europe 1 Infos" : "A Paris, le Premier Ministre Lionel Jospin, qui se trouvait à son QG de campagne, (a dû) rentre(r) en urgence à l'Hôtel Matignon" . Si tout s'est bien terminé cette fois, dans 15 pour 100 des accidents d'avions la cause est une mauvaise compréhension entre les pilotes et les aiguilleurs du ciel .

A Pékin, on se prépare pour les J.O de 2008 ("Courrier International" du 7/2) . La transcription phonétique de phrases anglaises en mandarin est ainsi donnée dans un manuel : "Thank you" (Merci) devient "san kuai' r rou" (trois morceaux de viande !) et "I'm sorry" (Désolé/e !) est transcrit "ai mu sao rui" (triste maman quant bon !) . A nous de montrer lors de l'Universala Kongreso de 2004 à Pékin que l'espéranto pose moins de problèmes !

édito

La langue universelle

On dit les Français peu doués pour les langues étrangères. L'empreinte de notre terroir nous jouerait-elle des tours? Qui nous dit, en effet,



que le roulement des « r » à la bourguignonne ou l'accent chantant du Midi ne seraient pas un frein rédhibitoire à la prononciation de l'anglais, par exemple? Vous savez tous et toutes à quel point il est difficile, pour nous les *froggies**, de rétracter notre muscle de la parole en arrière-gorge afin de tenter d'articuler correctement la phrase symbole «*My tailor is rich*». Notre accent tonique, systématiquement marqué à la fin des mots, nous pénalise aussi lorsque, encouragés par la trompeuse

ressemblance d'une phrase en italien ou en espagnol, nous osons la prononcer... au grand désespoir des oreilles latines qui nous écoutent. Certains vous diront qu'on ne peut s'exprimer dans une autre langue que lorsque ses sonorités nous plaisent, que le pays nous fait envie et que le professeur excelle dans sa spécialité. Il existe pourtant d'autres motivations, comme la magnifique idée d'un certain docteur Zamenhof, médecin polonais, qui créa de toutes pièces en 1887 une langue universelle destinée à rapprocher les hommes de toutes nationalités. Aujourd'hui, l'espéranto séduit encore des millions de personnes dans le monde. Selon Josette Ducloyer (page 18), enseignante au bout de quatre ans de pratique, on peut s'y mettre à n'importe quel âge, même si l'on n'est pas doué. À l'heure de la mondialisation, pourquoi ne pas rêver du jour où tous les humains se comprendront enfin!

C. Litaud

*Mangeurs de grenouilles, selon les Anglais.

LE PAYS BRIARD PAGE 2

OPINIONS

MARDI 19 MARS 2002

Ne pas confondre Fire et Five !

- *Fire on board !*

C'est un pilote (français) pilotant un Airbus A 320, entre Toulouse-Blagnac et Roissy (ou Orly) qui s'adresse à un aiguilleur du ciel (français). A bord, 148 passagers.

L'aiguilleur entend :

- *Five men on board...*

Ça y est : ce sont des terroristes ! L'aiguilleur donne l'alerte. Deux avions de chasse décollent pour prendre en chasse l'avion "terrorisé".

En fait, le pilote avait distingué quelques fumerolles dans le cockpit de son appareil.

- Feu à bord ! avait-il voulu dire.

- Cinq hommes à bord, comprit son interlocuteur.

Pourquoi parler anglais sur le territoire français, dans le ciel français, à bord d'un avion français ? Autrefois, avant Anne Boleyn et Henri VIII d'Angleterre, ce sont les Anglais qui parlaient français. Aujourd'hui, c'est le contraire : le voilà bien, le progrès !

L'avion est revenu à Toulouse; 46 minutes plus tard, il atterrit. Les

passagers sont débarqués. La prochaine fois, pour plus de sûreté, ils prendront le T.G.V. Ils arriveront à l'heure au cœur de Paris et pourront honorer les rendez-vous qui les attendent (si quelques "snsésistes" ne sont pas en grève ce jour-là).

Mais enfin, la catastrophe a été évitée.

Conclusion des journalistes, des responsables du transport aérien et des dirigeants politiques :

- Le principe de précaution a été parfaitement appliqué, le plan de protection Pirataire s'est avéré efficace.

Tout le monde est content.

Une autre conclusion devrait pourtant s'imposer : l'utilisation de l'anglais, et de toute autre langue, vivante ou morte, met en péril la sécurité des voyageurs dans le monde entier. Deux Français parlant anglais ne se sont pas compris. Mais un pilote sri lankais, s'adressant à un contrôleur suédois, esquimau, hongrois ou japonais, comment se comprendraient-ils mieux, avec ce foutu accent que personne ne maîtrise ?

Sans compter le reste : verbes irréguliers, exceptions multiples à toutes les règles, etc.

Comment les responsables politiques du monde entier ne se posent-ils pas la question de savoir s'il serait possible d'utiliser un moyen de communication simple, efficace et juste ? Ce moyen existe, c'est l'espéranto. Mais tous ont décidé une fois pour toutes que l'espéranto n'existait pas et ne pouvait pas exister.

Alors que dix millions de personnes le parlent, l'écrivent, le comprennent parfaitement à travers le monde; que la barrière de l'accent n'existe pas avec lui; qu'un enfant dès l'école primaire peut l'apprendre en deux ans; que les économies réalisées grâce à cette langue universelle permettraient d'investir des milliards d'euros dans la promotion de l'économie mondiale pour aider les gens de partout à vivre mieux; que l'Europe, avec ses onze langues nationales, risque d'être étouffée sous la montagne de papier nécessaire à la diffusion des

traductions; que l'espéranto introduit à la connaissance des langues nationales dont elle protégera la pureté, l'élégance et la littérature.


Car la nécessité d'utiliser un langage universel, à partir de l'anglais, puisque c'est l'anglais qui est la langue la plus universelle à l'heure actuelle, aboutira nécessairement à l'abâtardissement de cette langue. Comme le latin s'est abâtardi après la chute de l'Empire romain. A partir de l'anglais, les baragouineurs du monde entier fabriquent un innombrable sabir qui ne ressemble à rien et d'une imprécision telle que fleurissent contre-sens, faux sens et erreurs d'interprétation multiples. Comme celle qui a été commise dans le ciel de Toulouse, où le feu a été confondu avec les terroristes !.

Ah oui, mais trouver une solution simple à un problème compliqué, ce n'est pas à la portée des grands esprits qui nous gouvernent.

Michel VINCENT

DISTRA PAĜO
KRUCVORTOJ

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10




HORIZONTALE

- I) - Politikism(o).
- II) - Fremdul(a) / Subjunkcio.
- III) - Arbo / Ligil(o).
- IV) - Bredado / Nombra litero.
- V) - Transsendilo / Tertavol(o).
- VI) - Riverbest(o) / Artikolo.
- VII) - s : Gajno / Cerbopart(o).
- VIII) - Mise.
- IX) - Hiosciamin(o).
- X) - La temp(o), ofte.

s : sone

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10



VERTIKALE

- 1) - Ekonomika doktrin(o).
- 2) - Vaganta Jud(o) / Papag(o).
- 3) - El norda arbaro / Kutim(a) ne ĉiam kutima.
- 4) - Ofte Ministrejo / Religiem(a).
- 5) - Malinda relajso / Bird(o).
- 6) - Malpli bongusta ol ti(u) mara / Tono.
- 7) - s : Patriarko / Anatomiaĵ(o).
- 8) - Kiei handikapulo.
- 9) - La sekvant(a), ekzemple.
- 10) - Drog(o).

BOPARO

HUMURO

"Esperanto" evoluas . Jen desegnaĵoj el la lasta numero

Plena Ilustrita Vort(lud)aro



SOLVOJ DE LA ENIGMOJ

Ĝirafopopotarino : La nombro da ĝirafoj estas minimume 2, do la nombro da rinoceroj estas maksimume 8-1-2 = 5 . La nombro da ĥipopotamoj estas minimume 7+1-5 = 3. Do la nombro da ĝirafoj estas maksimume 5-3 = 2 . Ili estas minimume 2, do fakte ili estas 2 . Malpli ol 6, maksimume 5 estas rinoceroj kaj maksimume 3 estas ĥipopotamoj . Sed pli ol 7 ne estas ĝirafoj, do estas precize 5 rinoceroj k. 3 ĥipopotamoj, entute 10 bestoj .
La Mondo : Unu kvinono au 6 tridekonaj = teroj . Triono de la teroj do du tridekonaj en la suda hemisfero . Por la suda hemisfero, do 15 tridekonaj de la globo, restas 13 tridekonaj da oceanoj . 13/15 = 86,67% .

SFS 161 aperos komence de julio .
Limdato por viaj kontribuoj : 25/6.
Adreso : Jean Hénin Beauregard
Route de Montcayroux
48500 La Canourgue
Tel/Fax : 04 66 32 86 36
Jean.Henin@wanadoo.fr